


## UEA ofertas al du studentoj someran semajnon en Vieno por lerni pri terminologio

Ĉu vi studas kaj interesiĝas pri faka komunikado kaj moderna administrado de scioj? Dum la **somero 2012** okazos en la **Universitato de Vieno** unusemajna **trejnado pri terminologio**. La celgrupanoj de la trejnado estas *iuj ajn*, kiuj interesiĝas pri faka komunikado. La trejnado eblas ankaŭ por homoj tute *sen* antaŭkonoj pri terminologio, kiuj tamen interesiĝas pri terminologia administrado, ĉu el la vidpunkto de lingvistoj (ekz. tradukistoj), ĉu el tiu de aliaj fakuloj (ekz. inĝenieroj aŭ komputilistoj kiuj okupiĝas pri teknologioj por komunikado, dokumentado, klasifikado de scioj...).



### Kio estas terminologio?

Ĉu vi ne konas la respondon? Ne tro gravas, vi lernu en Vieno! Ĉu vi jam cerbumis, kial oni diras « komputilo » kaj ne « komputero » aŭ kial kelkaj Esperantistoj skribas « Fejsbuk » dum aliaj uzas « Facebook »? Aŭ kial fakte la dulitera lingvokodo por Esperanto estas « eo »? Tiuj demandoj rekte rilatas al terminologia administrado kaj normigado! La tutmonda faka sciaro kreskas rapide kaj **novaj esprimoj aperas ĉiutage, nelaste en Esperanto. Mojose?** Jes, tamen faka komunikado kaj interŝanĝo de scioj postulas logikan strukturon kaj unusencajn esprimojn, kiuj eblas dank' al terminologia planado kaj administrado. Terminologio ĉiam ludas gravan rolon, kiam fakaj informoj aŭ scioj estas kreataj (ekz. per esploro), komunikataj (ekz. inter fakuloj), registrataj (ekz. en datumbanko), transdonataj (ekz. per instruado) aŭ serĉataj (ekz. per TTT). La terminologia scienco naskiĝis grandparte dank' al la laboro de la esperantologo kaj interlingvisto Eugen Wüster, do historie ĝi tute rekte rilatas al Esperanto!

### Kion ofertas Universala Esperanto-Asocio (UEA)?

Subtene al siaj junaj membroj, UEA ofertas al du studentoj la eblon partopreni la *Someran Terminologian Trejnadon* (TSS) en Vieno, Aŭstrio. Temas pri unusemajna, **neesperantista aranĝo por lerni pri terminologio**. UEA financos vian partoprenon. Se vi estas interesita studento, vi nur alportu vin mem, vian intereson, kaj eventuale viajn demandojn!

### Programo de la semajno en Vieno

**8-an de julio (dیمانĉo):** alveno al Vieno, renkontiĝo kun la UEA-komisiito pri terminologiaj instancoj, enloĝiĝo, kuketumado en Viena kafodomo, informoj pri la urbo, la historiaj ligoj de Esperanto al la naskiĝo de la terminologia scienco, pri la laboro de UEA en la kampo de terminologio kaj la faka kunlaboro kun terminologiaj instancoj

**9-an ĝis 13-an de julio (lundo-venredo):** trejnado en la Centro pri tradukadoscienco de la Universitato de Vieno<sup>1</sup>. La programo enhavos teorian enkondukon al terminologio, praktikajn aspektojn de terminologia laboro, prezenton de rilataj modernaj teknologioj (softvaroj), kreadon de terminologia datumbanko, ekonomiajn flankojn de terminologio, administradon de terminologiaj projektoj, multe da konkretaj ekzercoj por la partoprenantoj kaj, kompreneble, gufujajn kafopaŭzojn!

**14-an de julio (sabato):** elloĝiĝo, hejmvojaĝo



<sup>1</sup> Germane: Zentrum für Translationswissenschaft der Universität Wien / angle: Center for Translation Studies, University of Vienna (<http://transvienna.univie.ac.at/>)

## Avantaĝoj por studentoj

**Senkosta kaj senzorga por vi:** UEA pagos la kurson, la restadon, unusemajnan bileton por amasveturiloj kaj la vojaĝkostojn al Vieno<sup>2</sup>. UEA zorgos pri la administraj flankoj (partopreno, atestilo, ktp.), aranĝos la restadon kaj laŭbezone organizos la vojaĝon.

**ECTS-poentoj por la studado:** Partoprenantoj de la trejnado povas ricevi 6 universitatajn poentojn (tiel nomitaj « ECTS-poentoj ») rekompence al la unusemajna trejnado.

**Atestilo agnoskita en Eŭropa Unio (EU):** Post la trejnado eblas ekzameniĝi kaj, kaze de sukceso, ricevi oficialan atestilon de « Terminologia Manaĝero », kiu estas agnoskita en 18 EU-landoj. Se vi interesiĝas, bonvolu peti pli da informoj.



**Moderna, aĝ- kaj kulturmixita trejnado kun mondkonataj instruistoj:** Partoprenantoj de diversaj aĝoj kaj landoj kleriĝas dank' al kelkaj el la plej spertaj profesoroj pri faka komunikado kaj terminologio. Atentu: Estas strikte malpermesita pafmortigi la instruistojn, eĉ se vi ne tuj komprenas la kurso-enhavon!

**La ĉefurbo de Aŭstrio estis la hejmurbo de Zamenhof dum lia fakstudado pri oftalmologio:** Vieno<sup>3</sup> estas la sidejo de diversaj internaciaj organizaĵoj. En ĝi troviĝas interalie la fama *Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj*. La kursoj kutime finiĝas maksimume je la 18-a horo. Restas do

ampleksaj tempaj ebloj dum la somera semajno por konatiĝi kun aliaj studentoj kaj malkovri Vienon.



## Kandidatiĝu!

**Kondiĉoj:** paroli Esperanton, esti UEA-membro kaj studento, partopreni nome de UEA, labornivele kompreni kaj paroli la anglan<sup>4</sup>, redakti por UEA 2-paĝan raporteton pri la trejnado antaŭ la fino de septembro 2012, kaj prefere havi intereson por aliĝi al la UEA-komisiono pri terminologiaj instancoj en 2013.

**Simple kandidatiĝu:** Por kandidatiĝi, simple sendu vian UEA-kodon, la nomon kaj urbon de via alternejo aŭ universitato, kaj tekston (300 ĝis 500 vortoj) kiu priskribas viajn motivojn por partopreni la trejnadon.

**Limdato:** 8-an de aprilo 2012.

**Elekto-procezo:** La UEA-Estraro demokratie elektos du studentojn surbaze de la senditaj tekstoj.

**Anonco de la elektitaj studentoj:** Fine de aprilo 2012.



## Rilatoj de UEA kun terminologiaj instancoj

En 2011 UEA plifortigis siajn rilatojn al la komitato pri Terminologio kaj pluaj lingvaj kaj sciaj datumoj de la **Internacia Organizaĵo por Normigado (ISO)** kaj subskribis Interkonsenton pri kunagado kun Infoterm, la Internacia informejo pri terminologio. UEA celas daŭre pliampleksiĝi la fakan kunlaboron kun ĉi-tiuj du instancoj. **Infoterm** oficiale subtenas la partoprenon de UEA-studentoj al la *Somera Terminologia Trejnado*.

**Informoj kaj kandidatiĝo:** Mélanie Maradan (UEA-komisiito pri terminologiaj instancoj), [maradan@uea.org](mailto:maradan@uea.org)

**Retejo de la Somera Terminologia Trejnado:** [http://www.termnet.org/english/events/tss\\_2012/index.php](http://www.termnet.org/english/events/tss_2012/index.php)

<sup>2</sup> La du studentoj loĝos kune en junulargasteja ĉambro inkluzive matenmanĝo kaj la maksimuma limo por repagotaj vojaĝkosto estas de po 250 eŭroj por unu partoprenanto.

<sup>3</sup> germane *Wien* [vin]

<sup>4</sup> Dum paŭzoj oni memkompreneble rajtas uzi iun ajn lingvon, tamen por la instruado la angla servas kiel komunikilo. Por lerni pri terminologio rekte en Esperanto, vidu la retejon de Terminologia Esperanto-Centro (<http://esperanto.net/tec/>).